

ESPERANTO

★ TRIUMFONTA ★

Publikigilo de multaj gravaj esperantistaj organizaĵoj.

Aperas semajne. — Senpagaj monataj aldonoj: „Internacia Komerco“ kaj „Revuo“ (literatura, popolscienca).

Protaktantoj:

S-o Leono Zamenhof, Warszawa
W. M. Page, advok., Edinburgh
Ernest Archdeacon, Paris
J. Gill Norta, komercisto,
Barcelona

H. Fischer, grandindustriisto,
București
Frans Schoofs, Antwerpen
P. v. Medem, bank-kaj fabrik-
direktoro, Kaunas.

N-o 181
2. 3. 1924

Redakcio:

Cefredaktoro: Teo Jung.
Redaktoro: Robert Kreuz.
Redakciaj kunlaborantoj:
H. Jung kaj M. Butin, L. K.

Administracio:

Horrem b. Köln, Germanlando

Abonprezo

po numero egalvaloro de 0,06 dolaro
aŭ 0,30 sv. fk. por landoj, kies valuto
suficis maksimume 50%; por ĉiuj alia,
landoj 0,08 dol. aŭ 0,25 sv. fk.

Anonprezo

po kvadrat-centimetro egalvaloro de
0,20 sv. fk. (ĉe antaŭa pago 0,15 sv. fk.
en „Internacia Komerco“ la duoble)

Antwerpen, Barcelona, București, Edinburgh, Horrem, Kaunas, Paris, Warszawa

Bedřich Smetana.

Okaze de l' centjara reveno de lia naskiĝtago la 2 marto 1924.

La ĉeĥa nacia muziko estas ne sole rezultato de geniaj majstroj, sed baziĝas sur profundaj de nacia animo, kiu montris sin en valora trezoro de popolkantoj. La nacia muziko longtempe atendis artiston, kiu, estante animita kaj penetrata de ĝi, formus majestatan tempon de ĉeĥa muziko. Tiu granda artisto estas Bedřich Smetana. Li ekkonis riĉecon kaŝitan en popolkanto kaj eblecon, konstrui sur tiu ĉi bazo arton miraklan kaj strangan. Smetana ne kontentiĝis pri imitado de popolkanto, sed kreis originale, kompreneble en nacia karaktero. Tiamaniere komprenante la muzikon, li estis konvinkita, ke ĉeĥa arto devas esti starigita sur tiu arta alteco, sur kiu ekstaris progreso de la samtempa monda muziko. Pro tio li fariĝis partiano de modernaj fremdlandaj muzikideoj kaj malatentante, ke de malamikoj hejme li estis proklamita herezulo, kuraĝe paŝadis sur propra vojo al determinita celo. Smetana konceptis veran originalecon nacian kaj kunigis ĝin harmonie kun progresemaj tendencoj de l' samtempa muziko. En tio baziĝas lia grandeco, en tio lia signifo. Kaj hodiaŭ, je la okazo de centjara naskiĝo de Bedřich Smetana, ne sole Ĉeĥoslovakio, sed ankaŭ preskaŭ la tuta mondo preparas sin, honorigis en muzikfestaraĝoj la memoron de l' granda ĉeĥa muzikverkisto, kiu dediĉis sian dolorplenan vivon al arto kaj al nacio.

Bedřich Smetana naskiĝis la 2 marto 1824 en antikva urbo Litomyšl. Jam en la frua junaĝo aperis ĉe li mirinda muziktalento. Plej multe allogis lin fortepiano, ĉar sur tiu ĉi instrumento li povis eksplicite diversajn mallongajn komponaĵojn, kiujn lia muzikinstruisto notadis. Kiel 6-jara knabo Smetana unue konceradis kaj fariĝis baldaŭ amato de la tuta urbo. Fingro de gimnaziaj studoj estis por li kriza momento. Patro lia, kiu iam kun intereso, plezuro kaj fiero kulturadis la talenton de l' juna Frederiko, deziris, ke lia unua filo fariĝu oficisto, sed la interna voĉo vokadis la junulon sole al muziko. Tial li foriris kontraŭ volo de l' patro por studi la muzikon en centro de ĉeĥa muzikvivo Praha kaj deziris profundigi siajn sciadojn. Tie vivis la juna komponisto en tia malriĉeco, ke li apenaŭ gajnis panon. Pensante, ke artiston plej bone komprenas artisto, li konfesis sian mizeran situacion al fama muzikverkisto F. Liszt, kies komponaĵoj Smetana tre ŝatis ludi. Liszt helpis kaj per sia potenco influo efikis, ke muzikverkoj de Smetana estis publikigitaj en Germanujo; inter ambaŭ viroj de tiu tempo estis intima amikeco, firmigaĵa per ofiaj vizitoj. La nomo de Smetana konatiĝis ankaŭ en fremdlando kaj per agado de eksterlandaj amikoj li ricevis profitdonan postenon de direktoro de l' filharmonia societo „Harmóniska Selskabet“ en sveda urbo Göteborg. Sed post du jaroj li revenis, ĉar la kruda nordklimato malfavoris treege la sanon de lia edzino. Sur la vojo ŝi mortis en Dresden kaj Smetana veturigis en patrujon sole sian malvarman kadavron.

Hejme li komencis ellabori grandajn komponaĵojn, kaj nelonge post hejmeveno fariĝis mondfama opero de l' majstro „Vendita fianĉino“ (Prodaná nevěsta), kiu post „Figaro“ de Mozart estas la plej geniala monda komika opero; eterne juna muziko sonas en suna brilo el tiu ĉi verko.

La doloro ne restis nekonata al Smetana; jam je la komenco de la vivo li estis akompanata de granda mizero kaj kiam li staris en zenito de sia

krea kaj nacia laboro, li fariĝis objekto de la plej malbonaj atakoj de kolekplenaĵoj homoj, kiuj ne hontis kulpigi kaj nomi lin „pereiganto de l' ĉeĥa arto“, pro tio, ke li favoregis fremdan arton.



Bedřich Smetana.

Smetana tamen nenie malesperis; tial li sciis skribi siajn plej plezurajn kaj ĉarmajn komponaĵojn ĵus en momento, en kiu li plej multe suferis.

En aŭtuno de l' jaro 1874 kaptis la majstron plej terura sorto, kiu muzikiston povas renkonfi — la perdo de aŭdoso. Tiu ĉi malfeliĉo tamen ne haltigis la krea forton de lia genio, — kontraŭe, ŝajnas, ke Smetana, estante liberigita de eksteraj rilatoj kun la muziko kaj koncentriĝante je sia propra muzikvivo, grandigis ankoraŭ pli en sia arta kreado, simile kiel Beethoven. La animo de Smetana pli profundigis kaj komponas en surdeco ciklon de simfoniaj poemoj „Mia



Bedřich Smetana inter siaj amikoj en la jaro 1865. (Pentraĵo de F. Dvořák, eldonita de ŝtata eldonejo en Praha.)

patrolando“ (Má vlast), grandioza verko, interpretanta ardan amon al patrulando, rakontanta antikvajn mitojn pri la klara nacia estinteco kaj pri naturreleco. De tiu solena verko, en kiu li kantas pri la hejmo, returniĝas la majstro en sian internajn kaj kreas kvarteton „El mia vivo“

(Z mého života), unu verkon, en kiu li malvalorigis propran doloron kaj en kiu kulpigis pro sia katastrofo — la surdecon. Estas tre interese, ke Smetana en absoluta surdeco verkis siajn plej belajn komponaĵojn.

Je la komenco de l' jaro 1884 estis faritaj preparoj al jubileo de la 60-a reveno de la naskiĝtago de l' surda majstro, sed lia animo sciis nenion pri tio. Pli kaj pli profunde li malprogresadis en terura nokto de frenezeco, tiel ke la morto, kiu lin kaptis la 12 majo 1884, liberigis lin el grandega turmento.

Smetana fariĝis fondinto de la ĉeĥa muziko per enkonduko de nacia karaktero en simfonian poemon kaj muzikdramon. Li daŭrigis la idealon de Liszt kaj R. Wagner, tiamaniere certigante al si honoran lokon en ĝenerala muzikhistorio de l' mondo.

Ladislav Šimerda, Rychnov n. Kn.

Rimarko: La aŭtoro de tiu ĉi artikolo estas komplezema doni al interesatoj de ĉeĥa muziko konsilojn pri ĝia studado. Adreso: Ladislav Šimerda, juristo, Rychnov n. Kn., 446, Ĉeĥoslovakio.

La „Vendita fianĉino“ kaj ĝia signifo.

Jen la titolo de plej populara bohema opero, tre interesa aperaĵo en historio de nia tuta arto! La aŭtoro de vortoj teksto estas Karel Sabina, artisto-proletario, kiu apartenis al rondeto, konstruanta en la jaroj 30—40 de esinta jarcento nian modernan arton. Nova generacio postulis sub influo de potenco movado de Juna Germanujo novan artiston. Nacieco, laŭ ili, ne estas limigita arkreadon, sed devas trapenetri nian arton nova direkto kultura, universala kulturinfluo en homara evoluo. Tiu malnova principo pri imitado de popolkantoj malebligis nature la disvastigon de artolibereco, same kiel plialtigis de vereco kaj traviveco en la arto. Imitado estas ja atingebla al ĉiu fremdlandano, sed krei el nacia vivo — tion povas nur vera nacia artisto. En nia literaturo aperis tiuj ĉi

novaj influoj unue, sed ne plej sukcesplene. En muziko aperis majstro — B. Smetana — kiu apartenas pro sia artisto konfeso ankaŭ al nova generacio. Li celis konstrui boheman nacian muzikon sub influo de viviga mondato el radiko de popolvivo. Plej alta triumfo sur tiu ĉi principo estas lia muzikverko por „Vendita fianĉino“. — En bohema opero antaŭ eliro de Smetana regis dilettantismo. Kontraŭe al ĝi Smetana estas naskita muzikisto, kiu jam en sia knabeco vivis nur por muziko. Per verkado de Smetana estas esprimita potenco en nia arto la artista subjektivismo, — li estis vere programa komponisto. Tra ĉio, kion li verkis, brilas lia personeco, lia penso, lia vivo. Moderna homo ne postulas muzikon pro nura muziko, sed tian, kiu estas animita de modernaj ideoj, kiu plenigas lian animon. Jen esprimo de nova muziko en 19. jarcento, kiun unue diskonigas plej granda gigantulo de moderna muziko Beethoven. Kio estas tiu ĉi viro por tuta muziko, tio estas Wagner por la dramo, kiu redonis al ĝi ĝian verecon kaj tiel ankaŭ moralforon. Smetana poste estas majstro en muzikdramo el reala mondo, li estas tiu, kiu krom „Libuše“ komponis nur operojn el reala vivo, por kiu li ektravis tute novan muzikesprimon. Tiel Smetana estas vera kompletigo al Wagner en mond muziko. Apud serioza Wagner, kiu eĉ en „Majstroj-kantistoj“ ekridetas en sia

viraĝo, staras Smetana kiel unua majstro de komika opero de moderna tempo. Smetana volis krei en opero veran komedion en moderna senco, en kiu la humoro fluas ne el malebla farseco, sed ĵus el klara karaktero de pentrista reala vivo. Kion signifas Mozart por komika opero, siatempe realigis post li Smetana unu jarcenton pli malfrue. Post la tempoj de Mozart ŝanĝiĝis la stato de la arto tiel ege, ke estis necesa iu nova artisto verko, por ke ankaŭ nia tempo havi sian komikan operon grandan, kiu estas forta, ekfloras al sia plena vivo, sed en kiu ĉio vivanta devas esti potenco, se ĝi ne estas ruinigota de rapidfluo en nova vivo. Antaŭ ni kuŝas estonteco granda kaj brilanta, en kiu nia muziko plenuĝu sian tutan taskon tiel honeste, kiel ĝin efektivigis Smetana en bataltempoj por nia libereco.

J. K. Kopecký, Ríchnov n. K.

Socia Vivo.

Popolvoĉdonado pri laboraŭro en Svedujo.

La 17 febr. la svisaj voĉdonrajtigitoj devis decidi pri revizio de la landa fabrikleĝdono. Kvankam la nuna leĝo fiksas la posemajne 48 horan laboraŭron kaj jam enhavas la eblecon plilongigi ĝin per aparta permeso de l' svisa registaro ĝis 52 horoj, la reviziota paragrafo estonte estus permesinta laborigi ĝis 54 horoj dum la „daŭro de krizo“ de la tri venontaj jaroj. Post ambuflanke tre vigla propagando la voĉdonrezulto estis jena: Jes 518870, Ne 451562, do la revizio estas malaprobata per plimulto da 127692 voĉoj ĉe partopreno de 76 procentoj da voĉdonrajtigitoj.

Pl. Hr.

Scienco.

Ĝirurgio.

Bestoprotekto kaj besteksperimento.

De D-o Ludwig Reisinger.

Estas ĝenerale konate, ke bestoprotektemuloj obstine kontraŭas al eksperimentoj farataj de fiziologoj kaj aliaj fakuloj je bestoj. Prave akcentas la kontraŭuloj, ke la besteksperimento estas necesege por la biologiaj esplorado kaj instruado. Jen estu provata per malmultaj vortoj kompromispropono samgrade kontentigonta la postulojn bestoprotektajn kaj eksperimentajn.

Ke vivisekcio estas nepre necese, ne estas fordisputebla. Ĉar, kiel kemio kaj fiziko estus neimageblaj sen metoda provado, tiel same ankaŭ la biologiaj sciencoj sen eksperimentoj je vivaj organismoj. Estas certe, ke lerta kaj zorgema eksperimentisto malnecese neniel doloras beston. Li operacias bestojn intense narkotigitajn, kaj poste la bestoj aŭ estas tute senmekapablaj, ĉar post certaj operacioj mankas al ili la konscio kiel ekz. post eligo de la cerbo (ekstirpacio); aŭ ili refortigigas rapide post tiaj operacioj kaj tuj poste ne montras dolorojn. Certe lerta eksperimentisto ĉiam estas supozata.

Unue do sperteco kaj rutineco de la operacisto estas gravaĵo ĉe la besteksperimento. Due ankaŭ estu konstata, kiuj eksperimentoj entute estas pravigeblaj. Jen kompreneble preciza disklaso ne estas farebla. Ĉiukaze nur bone motivitaj eksperimentoj estu farataj kaj evititaj tiaj, kies rezulto krome jam estas certega kaj ripetite kontrolita. Sed la ĉefaĵo restas la decido, kiuj bestoj ŝajnas precipe taŭgaj por eksperimentoj. Ĉi tiu problemoj jene estas solvota, ke bestoklasoj kun cerboj malmulte evoluintaj unuavice estas taŭgaj por besteksperimentoj, ĉar ĉe tiaj ekzistas nur malmulte da konscio, ĉe specoj malaltrangaj eble preskaŭ minimumo da ĝi. Laŭ tio certe

ankaŭ la dolorsentado estas plej malforta, certe ofte ekestos eĉ nur instinktaj refleksmovoj kiel reakcio je operacia ago. Ĉar estas evidente, ke la intenso de la dolorsentado estas konforme al la grado de la konscio. Tion ja pravas la fakto de la narkozefiko per tio, ke la sentemo estas des pli malgranda, ju pli intensa estas la narkozo, kiom pli malforta do estas la konscio. Kiel allaseblaj al eksperimentoj laŭ tio ŝajnas ĉiuj senvertebruloj kaj inter la vertebruloj; fiŝoj, amfibioj, reptiloj. Je ĉi tiuj bestoklasoj, se iel estas eble, la eksperimentistoj sin limigu. El bestoj pli altrangaj oni por vivisekciuj elekto nur tiajn specojn, kiujn interne de sia klaso aŭ familio spirite estas taksataj nur malalte, inter birdoj eble kolombojn kaj kokojn, inter mambestoj la malaltrangan klasojn, kiel kuniklojn, fokojn, kelkajn aliajn mordetulojn, remaĉulojn. Nepra maltaŭgaj por besteksperimentoj estas katoj, hundoj, simioj, kies bone evoluinta cerbofunkciado multe ilin suferigas je tiaj operacioj. Escepto estu farata, se temas pri sciencaj decidoj supozantaj bon-evoluan nervaron, kiel eble la esplorado de malfunkcioj post cerboleĝoj. En tiaj okazoj oni devus sin limigi je nombro kiel eble plej malgranda. La fakto de la esplorado tie devas trovi la ĝustan manieron por tiajn operaciojn igi senkrueblaj.

Do, se oni kunmetas la vicon de la eksperimentbestoj komencante per la plej taŭgaj (plej malmulte sentemaj) rezultas jena skemo:

1. senvertebruloj
2. fiŝoj
3. amfibioj
4. reptiloj. Ĉi tiuj klasoj sen diferenco inter la specoj.
5. kolomboj
6. kokoj
7. mordetuloj (ratoj, fokoj, kunikloj).

Mallongigita. Trad. Dr. Dr. Fr. Fr.

Arto.

En Paris mortis ĵus en aĝo de 74 jaroj la pentristo Jean François Raffaëlli, unu el la kuntempojn kaj kunbatalantojn de l' reprezentantoj de la impresionismo. Kvankam liaj laboroj similas al tiuj de Monet, Sisley, Renoir, Pizarro, oni ne povas simple envidigi ilin en la produktado de la impresionismo. Li prunteprenis el ĝi la estetikajn, sed ne la teknikajn principojn. Lia atingis grandan famon kaj farigis la „pentristo de Paris“. Li estis gvidanto de movado, kies rezultote estis la kreado de la „Société Nationale“. — Li ankaŭ eltrovis oleohavan paŝtelkrajonon, per kiu li sukcesis bone labori. Lia eltrovitaĵo tamen ne enpenetris en la praktikon. — Li ankaŭ provadis verki. Liaj „Promenades au Louvre“ estis volonte legatitaj.

R. Kr.

Junulara movado.

Agado de ĉeĥoslovaka geskoltaro dum libertempo 1923.

Dum libertempo 1923 partoprenis 12166 geskoltaroj konstantajn kaj migrantajn tendarojn. Entuta elspezo sumiĝis je 3209000 kĉ. kies plejmulton havis la ĝemarioprenintoj mem; pro subteno de malriĉaj skoltaj estis disponita sumo de 210000 kĉ. En ĉiuj partoj de l' respubliko estis starigitaj 412 tendaroj en daŭro de 2 ĝis 8 semajnoj kun 8340 partoprenantoj. El migrantaj tendaroj estis 28 en Polujo, Svedujo, Danujo, Germanujo, Belgujo, Francujo, Anglujo, Svislando, Algerio kaj Tunizio, Italujo, Jugoslavio, Bulgarujo kaj Rumanujo. — Post tre bonaj spertoj dum estintaj jaroj la unuigo de ĉeĥosl. skoltaj aranĝis

en jaro 1925 entute 35 koloniojn ĉe Adriatika Maro kaj 1 kolonion en Danujo ĉe Balta Maro, kiuj ampleksis 626 geskoltarojn. Ilia elspezo superis 400000 kĉ. Laŭ „Skaut-Junák. Kopĉa.“

Kroniko.

Por servi nian legataron per ĉiam aktuala, fludinda kaj kompleta informaro, ni bezonas scilginojn (sur postkarto aŭ aparta folieto unuflanke skribita, sed ne inter administraj aŭ privataj scilginoj) pri ĉiu novaĵo el la Esp. movado. Kondicioj: rapide, koncize, fludinde, legeble (precipe nomoj)

Landoj.

Eŭropo.

Liberŝtato Danzig.

Danzig. En la ĝenerala kunveno de la Danzig'a Esp. Asocio, okazinta la 24. 1. 1924, estas decidite, ke ĉiuj membroj de DEA ankaŭ tuj fariĝu anoj de UEA. Kiel delegito estas reelekti: Bernhard Aeltermann, supera urbssekretario, Danzig-Langfuhr, Bärenwed 4a; vicdelegito Max Neumann, Diplom-inĝeniero, Danzig, Lastadie 55a. Poŝta adreso kaj oficejo: Danzig, Töpfergasse 55. Koizoo sama kiel tiu de la ŝmidejanoj de l' germana regno. La DEA restas korporacio de l' Germana Esperanto Asocio. B. A.

Franco.

Dijon. La grupo de Dijon estas restarigita dank' al la klopodoj de D-o Diard, eksprezidanto de la grupo de Le Creusot kaj de s-ano Petit.

Perpignan. La famkonata komerca lernejo „Pigier“ nomis kiel profesoron de lingvo internacia helpa Esperanto, s-on René Lech, ĉefsekr. de la Esp. grupo en Perpignan. Kursoj baldaŭ funkcios kaj s-o René Lech intencas fari publikan paroladon pri „Esperanto kaj Komerc“ en tiu lernejo.

— La jara kongreso de la Mediteranea Federacio okazos en Perpignan je la Pasko (20 aprilo 1924). Oni publikigos baldaŭ programon de tiu kongreso, kiu certe havos grandan sukceson. Por ĉiuj informoj oni sin turnu al s-o René Lech, 5 Rue de la Savonnerie en Perpignan.

— Kataluna kongreso okazos dum la Pentekosto en Vich. S-o René Lech aranĝos specialan karavanon por veturi al tiu kongreso. La ĝeosp-istoj dezirantaj partopreni tiun kongreson estas petataj interriligi kun s-o René Lech, 5 Rue de la Savonnerie, Perpignan.

Germanujo.

Breslau. La 15. febr. faris s-o Adolf Seltan en Zwinger-gimnazio antaŭ 500 membroj de Monista Junularo „Sonne“ efikan paroladon pri Esp. (W. Thielking).

Euskirchen (Rejnlando). Laŭ invito de la novefondita grupo „Obsidino Antaŭen“, s-o Kreuz, redaktoro de ET, faris la 22. 2. en liceo propagandparoladon antaŭ proksimume 100 personoj. La juna grupo vigle laboras kaj esperas baldaŭ komenci kurson. Oni varbas speciale pri instruistoj. E. K.

Glauchau. La 6. febr. s-o supera instruisto E. Klemm, Chemnitz, faris propagandan paroladon pri „Esp. ekonomio kaj kulturo konsiderata“. La interesa parolado instigis kreon de nova kurso.

Hungarujo.

Esperantflingvaj prelegadoj de Prof. Pázmány en Budapeŝto.

La 25 januaro kaj la 8 februaro okazis la ne ĉiutagaĵ, vere tre interesaj prelegadoj de s-o univ. Prof. D-o Pázmány pri la jida moderna literaturo de Litovio kaj Polujo. La prelegadoj estas tiel abundaj, detalaj, objektivaj kaj interesaj, ke ili meritis eldonon en aparta libreto kaj pri ĝi raportis ankaŭ kelkaj ĵurnaloj. La ĉeestanta malgranda aŭskultantaro atente aŭskultis kaj per aplaŭdige honoris la profesoron, kiu cetere estis ĝis nun preskaŭ tute ne konata inter la esperantistoj, kvankam li jam antaŭ la milito verkis en Bratislava (Pozsony) libreton pri Esp; kaj postulis de la ministerio por instruado ĝian enkondukon en la mezlernejoj. Espreble li konstante kunlaboras estonte science kaj propagande por nia lingvo.

Nova prezidanto por la hungaroj.

Laŭ sciigo el Budapeŝto la membroj de la Hungara Esperanto Societo perdis sian ŝatatan prezidanton prelaton Gieswein deziras pei por akcepti tian oficon la

Pri la tombo de l' faraono Tut-Ank-Amon.

Historiaj detaloj.

En n-o 177 de ET mi donis raporton pri la eltrovo de l' sarkofago de la faraono Tut-Ank-Amon. Laŭ parolado de konata egiptologo, Prof. Spiegelberg, mi faras ĉi sube kelkajn historiajn rimarkigojn sendube interesindajn al la legontoj.

La „valo de la reĝoj“, en kiu ripozas multaj regintoj de Egiptujo, kaj kie troviĝas ankaŭ la tombo de Tut-Ank-Amon, estas regiono ĉirkaŭita de rokaj montoj. Rilate la tombojn oni devas diferencigi du periodojn kaj lokojn. Unue la morturbo de Memphis el la tempo de la konstruado de l' piramidoj. Due la tomboj de Theben de la jaroj 1600—1000 a. Kr. La lastaj devenas el la tempo de la 18.—20. dinastio, kiam la lando estis en plej bona prosperado kaj la militakiraĵo de Azio, Nubio kaj la fributpago de la dependuloj alportis al la regnestroj grandegajn riĉaĵojn.

En tiu ĉi periodo ĉirkaŭ la jaro 1550 a. Kr. estas konstruita la nove eltrovita reĝa tombo; kaj pro tio klariĝas ĝiaj diversspecaj valoroj. La tombo estas ankaŭ la unua, kiu estas trovita preskaŭ tute netuŝita. La tomboĉambroj de la diversaj tomboj estis plejofte jam en la antikveco prirabataj de ŝtelistoj kaj rabistoj, kiuj kunprenis de la multekostaĵoj tion, kio ŝajnis altvalora. Ankaŭ la tombo de Tut-Ank-Amon ricevis tian viziton de ŝtelistoj, sed pli poste, supoze sub la reĝado de l' reĝo Haremheb (1500 a. Kr.), kiu prenis sur sin la zorgon pri la tomboj prirabataj, ĝi estis ree ordigita kaj zorgeme fermita. Ke la tombo ne pli frue estis trovita kaj malfermita,

oni dankas nur al favora cirkonstanco. La ruboj ĉe la konstruado de la tombo de Ramses IV, iom supre lokita estas falintaj super la enirejon de l' tombo de Tut-Ank-Amon, tiel formante naturan ŝirmkovrilon.

La eltrovo de ĉi tiu tombo ne okazis hazarde, sed ĝi estis la frukto de celkonscia esplora laboro. De la tempo, kiam la tomboj estas pristelitaj de rabistoj, ni posedas ankoraŭ procesraportojn sur papirusaj pri la juĝaj kunsidoj kontraŭ la ŝtelistoj. En tiu ĉi proceso la tombo de la historie konita faraono Tut-Ank-Amon ne estas menciita. Do, oni konjektis ke ĝi restis netuŝita kaj komencis la serĉon pri ĝi antaŭ 10 jaroj.

Estas speciala bonŝanco, ke celkonsciaj esploristoj malkovris la tombo kaj kun respektemo esploras ĝin.

La malkovro de la tombo estas unu el la plej grandaj arkeologiaj eltrovoj de ĉiuj tempoj. La historia gajno ne estas granda, ĉar historiaj dokumentoj ne estas trovitaj. Sed kulturhistoria materialo estas trovita en tia abundeco, kiam ni el tiu periodo ne jam posedis.

La imagon, kiun la fakuloj pri tiu ĉi kulturperiodo havis, estas pliriĉigita kaj riĉigata je multaj novaj artaĵoj. J. Bernhard, München.

Pri la esplorado.

Post laborplenaĵ semajnoj en la „Valo de l' Reĝoj“ Howard Carter finis sian kulturhistorie valoran verkon per la malfermo de la sarkofago de l' faraono. Ne vanaj estis la esperoj de la esploristo, ĉar montriĝis, ke la mumio de l' potenculo estis nek difektita nek tuŝita. Precipe

la netuŝiteco estis dubinda fakto pro tio, ke la kovrilo de l' sarkofago konsistas el granito, dum ke la sarkofago mem estas skulptita el sabloŝtono. Krome la peza kovrilo estas rompita kaj fendita. Nur malmultaj personoj ĉeestis la solenan malfermon. Speciala aparato suprenlevis la kovrilon, kaj nun videbliĝis tuko el iom flaviĝinta tolo, el kiu la kapo de la mumio kelkajn centimetrojn elstaris. Sub tiu ĉi toltuko kuŝis dua tute nedifektita, tra kiu briletis la orbrilo de la mumio. Post forpreno de ambaŭ tukoj prezentigis la mumio, homsimila ujo el gipsumita ligno, riĉe orumita kaj ornamita. La grandega ĉerko kuŝis sur malalta portilo, oraj leonkapoj ĉirkaŭstaris la kapon, la surbrustigitaj manoj tenis la reĝajn sceprojn el oro kaj fajenco. El pura orpeco estis ĉizelita la vizaĝo, el kristalo faritaj la okuloj. La frunto kovris la sankta serpento kaj vulturo el orfajenco. Krono el branĉoj olivarbaj ornamis la kaphararon. La „ligna homo“ havis grandan similecon al la portreto de l' reĝo kaj montris lin en lia junaĝo. Ĉirkaŭ la tuto sin etendis surskribitaj borderaĵoj rubandaj, protektantaj dioj flankstaris seriozavizaĝe. Pli multe ol la oramasoj kaj juveloj impresis la malfajsciaj floroj kuŝantaj sur la kapo de la mumio, kiuj ne estas perdintaj sian freŝecon, kvankam oni ilin tien metis antaŭ 3200 jaroj. — Post kelkaj horoj Carter ree fermis la ĉerkon. Kun bedaŭro ni devas menci, ke la egipta registaro malpermesis al la esploristoj pluan laboron en la tombo. Carter plendas publike pri tiu stranga decido de la egipta registaro, ĉar ĝi malhelpas la ĝisfinan akuratan esploron de multe da gravaj, kiujn bezonas niaj egiptologoj por envicigi novan ŝtonon en la konstruaĵoj de la scienco. M. Butin, L. K., Godesberg.

konatan scienculon kaj membron de Eksterlandafera Asocio: budapestan episkopon Nemes kaj oni esperas, ke li akceptos la prezidantecon. La hungaraj samideanoj kaj nia movado multon gajnis, se episkopo Nemes akceptus la gvidadon de la hungara movado kaj li estus bona posteulo de nia neforgesebla prelo Giesswein.

Italujo.

Carpi. La 20 januaro nia fervora samideano Grafo Jozefo Bonasi fondis esperantan grupon ĉe la Katolika ĵurnalara Rondo. Baldaŭ malfermiĝos kurso. Gratulojn kaj bondezirojn!

Jugoslavio.

Brakar. La 20. 1. s-o Branko Sirola malfermis Esp. kurson kun 18 partoprenantoj.

Split (Dalmacio). La ĉiutage kreskanta movado en la provinco superas ĉiujn atendojn. La 21 jan. okazis la ĝenerala jarkunveno de nia Esp. Klubo. Ĉe ĉi oni reelektis kiel prez. s-on Rupčić, vicprez. s-on Armada, krome kiel komitatarojn Margetić (sekr.), Krolo (kas.) kaj Marčić (bibl.). — La kongresa komitato decidis turni sin per ĉirku- leroj al la enlandaj grupoj kaj izoluloj por dece prepari la II. Sudslavan Esp. Kongreson en nia urbo. Al la naj- barlandaj socioj oni dissendos ankaŭ ĉirku- leron por konsilioj, proponoj kaj partopreno al la II-a.

Trogir. Post la propaganda parolado de s-o Rupčić el Split malfermiĝis kurso gvidata de la Splitaj samideanoj. La prepara komitato por starigo de Esp. klubo vigle laboras. Oni aranĝos dum la printempo kelkajn komunajn ekskursojn kun la Splita Klubo.

Orebić. Dank' al la klopodoj de s-o Krstelj, iuĝisto kaj s-o Lanevo, paroĥestro, oni povas registri ankaŭ ĉi tie sukcesan movadon. Baldaŭ oni malfermos kurson.

Mali Prolog. Diligenta s-o Nikolac preparas ĉion necesan por malfermi kurson. Aliĝis jam 22 vilaĝanoj.

Igrane. La sindona agado de s-o Grbić donas bonajn rezultojn, dank' al la kunhelpo de s-o Sumić el Podgora.

Polujo.

Warszawa. Fine de pasinta jaro formiĝis tie ĉi Aka- demia Esperantista Rondo ĉe Hebra Akademika Asocio (Zydowska Strzecha Akademicka). Estraro estas ĝes- tudentoj: prez. St. Folman, sekr. J. Wizenberg, bibl. J. Blesler, kas. D. Frischman.

La rondo aranĝis vicon de prelegoj. Parolis Esp. Prof. E. Wiesenfeld pri „Historio de internaciaj lingvoj“ kaj s-o Hartman pri „Hodiaŭa stato de esperanta movado“. Ankaŭ la rondo malfermis du kursojn kun 26 gepartopren- antoj por D-o Jerzy Plik. Al rondo aliĝis 40 ĝes- tudentoj.

Adreso por korespondado: Akademia Esperantista Rondo ĉe Zydowska Strzecha Akademicka, Warszawa, Nowy Świat 21, aŭ adreso de prez. Stanislaw Folman, Warszawa, Pańska str. 13a.

Gazetaro.

Reichenberger Zeitung. 11. 1. Nova Esp. kurso en Leipa, — 20. 1. Novaj Esp. kursoj en Reichenberg. — 27. 1. Pri radioparolado el Prag. — 30. 1. Pri radioparolado el Botmemouth. — 8. 2. Esp.-parolado pri radiotelefono.

New Jersey Post, Town of Union, 10. 1., 2. 2. Du informoj. Jornal de Brasil, Rio de Janeiro, 22. 11. La Nova Eŭropo. Laŭ ET.

Leitmeritzer Zeitung, Leitmeritz, Ĉeĥosl., 11. 1., 18. 1., 25. 1., 1. 2. Div. notoj en Esp. ang. Freigstein, Teplitz-Schönau, Ĉeĥosl., 6. 1., 13. 1., 20. 1., 27. 1. Div. notoj en Esp. ang.

La Caravane, Gaillacs. T., jan. Kun aldono „Kurso de Esp.“

L'Action Française, Perpignan, n-o 2, febr. Alvoko lerni Esp.

Republika, Lodz, 27. 1. Pri foiro de Leipzig (laŭ IK). Głos Polski, Lods, 27. 1. Same.

L'Indépendant, Perpignan. Esp. kaj komerco.

Le Cuir, ledindustria gazeto, Paris, jan. Art. pri la loda kaj ŝua industrio en Finnlando laŭ Esp. informoj.

Euskirchener Zeitung, 21. 2., 28. 2. Detala raporto pri Esp. parolado.

Euskirchener Volksblatt, 25. 2. Raporto pri Esp. parolado. Jugoslavenski Pomorac, marista gazeto. Zagreb. 3 artikoloj pri „Maristoj kaj Esp.“

Eugenia, Barcelona, dec.

Radio, Berlin, 10. 1., 10. 2. Tre detala artikoloj pri Esp. kaj radio.

XVI-a Kongreso de Esp. en Wien.

Dua bulteno.

